# Ol

Estas facile konstateble ke kunekzistas du apartaj uzoj de la vorto « ol », kvazaŭ tiu termino havas du distingeblajn sencojn en komparativaj formoj.

Komparo de du objektoj : *f(x) > f(y)*

La komparo rilatas al nombrebla, mezurebla aŭ taksebla koncepto (tial ĝi estas objektiva komparo) koncerne du apartajn objektojn (ĉisube respektive ruĝe kaj verde).

| | |
|---|---|
| La ĝirafo estas pli granda ol la tigro. | *granda(ĝirafo) > granda(tigro)* |
| La leporo kuras pli rapide ol la testudo. | *rapide(leporo) > rapide(testudo)* |
| Antaŭ ol decidi necesas pripensi. | *momento(decidi) > momento(pripensi)* |
| Ŝi manĝas frukton prefere ol kukon. | *ŝato (frukton) > ŝato (kukon)* |

Komparo de du konceptoj : *f(x) > g(x)*

La komparo rilatas al du konceptoj (ĉisube respektive ruĝe kaj verde), koncerne la objekton de la komparo. Ofte, la du komparataj karakterizoj estas malsame nombreblaj, mezureblaj aŭ takseblaj, ĉar malsamdimensiaj (*). Tiam la komparo estas subjektiva.

| | |
|---|---|
| Li estas pli stulta ol malica. | *stulta(li) > malica(li)* |
| La papero estas pli flava ol blanka. | *flava(papero) > blanka(papero)* |

(*) escepokaze la komparataj karakterizoj estas samdimensiaj, eĉ same mezureblaj :

| | |
|---|---|
| Li estas pli dika ol maldika. | *dika(li) > maldika(li)* |
| Li trinkas pli da akvo ol da vino. | *akvo-kvanto(li) > vino-kvanto(li)* |

Estas notinde ke tiu dualeco estas konstatebla okaze de egaleco :

| | |
|---|---|
| Li estas same / tiel granda kiel la frato. | *granda(li) = granda(frato)* |
| Li estas same / tiel stulta kiel malica. | *stulta(li) = malica(li)* |

Ĝi estas konstatebla ankaŭ en la franca lingvo (verŝajne en aliaj lingvoj) :

Cet individu est plus bête que son frère.

Cet individu est plus bête que méchant.

C.Rivière (la 21-an de aprilo 2022-a)